

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 16 – Julio – Aĝŝto – Septembro 1991

ISSN 0986-1181



SEN INICIATO ... NENIA REZULTATO !

Reklamon televido gurdas : lernu la Anglan, hodiaŭ ja "necesan"! Amasaj internaciaj kunvenoj multiĝas : sen ni, ŝajne senprobleme! Sciencistoj organizas multoblajn simpoziojn : lingvo-baro ŝajne nekonata! Infanoj ne konas nin : ili lernas "lingvojn"!

Raŭmistoj rekomendas kultivi la propran ĝardenon kaj ne plu deklami pri la "fina venko". Iel prave ... Sed per tio ili rabis la ekzisto-pravon de la "fin-venkistoj" nun malkuraĝigitaj : celo mankas al ĉi tiuj. Dume la Raŭmistoj riskas alian rifon : ĉu ili ne tendencas fermi sin en getto de nova speco, en kiu la flegado de mistera lingvo sendependa kaj superbela per si mem konsistigos la regularon de nova "religia" ordeno?

Tamen ili iel pravas!

Sed la aliaj ne tute malpravas!

Esperanto bezonas ĉiujn kaj ĝi povos sukcesi, t.e. unue transvivi kaj due floradi, nur se la homoj amantaj ĝin pretas trahaki vojojn por ĝi. Esperanto estos kulturportanto aŭ ne estos. Esperanto ekspansiigos aŭ forvelkos. Esperanto turnu sin al la vasta mondo aŭ kaŝu sin de la suno.

Sed kiujn prioritatojn unue flegi? Multaj nun estas hezitemaj : kiun vojon suriri? Sendube ne estas unu vojo, sed ja pluraj, versajne multaj! Ĉiu povu elekti la ĝustan laŭ siaj talentoj, siaj emoj, siaj logoj. Ĉiuj interkonsiligu!

Ni do opinias, ke la Akademio povus helpi per organizo de Simpozio post unu-du jaroj en konekto kun la tiama Universala Kongreso : temus pri ia nuntempa bilanco de la stato kaj estonteco de la lingvo Esperanto. Sub ĉiuj ties aspektoj. Specialistoj certe volos kunlabori.

Ni volonte konstrue korespondos ankaŭ kun vi pri tiu grava temo.

D-ro André ALBAULT

KRONIKO DE LA NUNTEMPO

Per eraro ne pravigas la faro!

Ofte diskonigi faktojn ebligas reformi misajn opiniojn!



Fojfoje stranga letero atingas la Akademion de Esperanto, kiel ekzemple ĉi tiu anonime adresita al la Prezidanto de l'AdE (el la Usona urbo Providence laŭ la poŝta stampo).

*

Estimataj Geakademianoj,

Laŭ mia opinio Esperanto estas tre malturpa lingvo. Inter la malturpaj lingvoj Esperanto estas certe la plej malturpa el ĉiuj.

Multaj el la uzantoj de Esperanto estas vere malmavaj esperantistoj. Tiaj lingvaj malmavuloj estas precipe la talentaj esperantistoj, kiel poetoj, verkistoj, eseistoj, k.s., kiuj dividiĝas en skolojn kaj literaturajn filozofiojn, kaj produktas malmavaĵojn tiel malmavajn, ke ni — esperantistoj la vulgaraĵoj, kiuj abonas la gazetojn kaj aĉetas la librojn — neniom komprenas ilin.

Vi povas supozi, estimindaj geakademianoj, ke mi plendas al vi pro viaj meritplenaj povoj super la lingvo Esperanto.

Respekte via,

La vulgara esperantisto.

*

Unue simpla rimarko : "La vulgara esperantisto" plendas al la geakademianoj "pro meritplenaj povoj super la lingvo".

Nu tio signifas, ke li ne komprenis, ke tiajn "povojn" la Akademio neniel havas; ja ĝi ĉefe observas la uzadon kaj provas per rekomendoj evitigi deviojn disde la unuiga Fundamento.

Se kelkaj geesperantistoj ekdetruas la unuecon de la Lingvo, ĉu per miskompreno de la konjugacia tradicio kiel en la ata-sistemo, ĉu per vortinflacio en la komuna lingvo kiel en esceptaj verkoj, tio ne dependas de la Akademio, kiu male jam de preskaŭ cent jaroj senĉese, nelacigeble memorigas pri la unuecigaj fundamentaĵoj de la Lingvo, sed tio rezultas el apartaj individuaj ambicioj modifi aŭ simple influi la evoluon de la Lingvo.

Ĝis nun feliĉe la Akademio plenum-is kaj -as sian alvokiĝon : kiel eble plej certigi la unuecon de la Lingvo Internacia. Cetere ne tiel agrabla misio! Oni ne konfuzu pri la celtabulo de la kritikoj; eĉ kiel en fama diraĵo oni redonu al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro!

Same oni ne konfuzu pri vortinflacio en la komuna lingvo kun la necesa pliriĉigo de la sciencaj kaj teknikaj terminaroj kiel temas en la artikolo de Fernand Boyet en la paĝo tria!

J.T.


PLUE PRI LA NUMERALOJ...

Skribis al la redakcio S-ro Fernand Boyet :

„... Vi aldonis 'rimarkojn de la redakcio', kiuj montras, ke mi ne sukcesis en mia provo klarigi mian opinion, kaj pro tio, por la redakcio, kaj eventuale por la publiko, kiu legis viajn komentojn, mi deziras iom respondi.”

Pri kardinalo. La unua kaj plej grava afero estas la vorto *kardinalo*. La redakcio indikas, ke temas pri "fundamenta nombro". Tio bedaŭrinde detruas ĉion, kion mi provis klarigi per la ekzemplo de la homoj kaj seĝoj precize por ne uzi tro fakajn vortojn. La vorto *kardinalo* ne povas esti klarigita per *fundamenta nombro*, ĉar *natura nombro* estas nur parto de la pli ĝenerala signifo *kardinalo*. Mi serĉis en fakaj terminaroj, kaj oni rilatigas la koncepton de *kardinalo* kun tiu de *povo*. Kaj tio sugestis al mi alian bildon.

Oni vidas la strekon AB, kiu videble estas pli longa ol CD. Sed tamen, ĉar por ĉiu punkto M de AB oni povas trovi per paralela projekciado unu kaj nur unu punkton N de CD, (kaj reciproke), tial oni diras, ke la du aroj (la aro de punktoj AB kaj la aro de punktoj CD) havas saman kardinalon. Sed estus stulte diri, ke la nombro de la punktoj de AB egalas la nombron de la punktoj de CD. En tia situacio la vorto *nombro* ne plu havas signifon, ĉar la vera vorto *nombro* rilatas nur al la finiaj aroj, dum unu streko estas nefinia aro. (Mi tute ne ŝatas la usonismen *fajnajto* enkondukitan en la suplementon de PIV).



Pri dekaria. Ne mi mem eltrovis tiun sufikson, kiu kuŝas en la suplemento de PIV (1987). Laŭ miaj scioj tiun sufikson proponis D-ro Olav Reiersøl ekde 1982 en sia verko : "Matematikaj kaj statistikaj terminoj en Esperanto" publikigita de la Universitato de Oslo. Via opinio pri *-nara* kolizias kun alia signifo de *binara* (prezentita de la aŭtoroj de fakvortaro publikigita en 1980 fare de la Instituto de Paderborn). Franclingve *binaire* estas uzata pri la bazo de numerado (binara) sed ankaŭ pri la rilatoj kies traduko estas *binara*. La du signifoj estas tute malsimilaj kaj la uzo de sama vorto por du tute malsimilaj konceptoj ne estas bona solvo. Cetere kiam la bazo de iu sistemo estas *ok*, la vorto *okaria* estas pli eŭfonia ol *oknara*. La nomoj de la numeraloj krom *du*, *tri* kaj *naŭ* finiĝas per konsonanto *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *dek*, *cent*, *mil* do plej bone la sufikso komenciĝu per vokalo. Plie mi rimarkigas al vi, ke la ĉerpo de *binaire* en la franca lingvo ne estas tre fekunda, ĉar kiam la bazoj de numerado estas *tri*, *kvar*, . . . *ok*, *dek*ses [mi citas la bazojn plej ofte uzatajn en informadiko], la franca lingvo mutas (oni diras *en base trois*, *en base huit* aŭ *en base seize*, dum la sola franca termino en tiu serio estas *duodécimale* por la bazo *dekdu*).

Pri la vorto *konvencia* mi tute ne deziris aludi pri la tradicio, kiu referencas al la Fundamento kaj al multaj similaj nacilingvaj esprimoj. Mi parolis pri konvencio, ĉar mi pensis, ke la uzo de *faras* apud la kvazaŭ-adjektivoj *du* kaj *tri* estas konvencia resumo por "la aldono de iu aro de tri objektoj al aro de du objektoj faras aron, kies nombro estas kvin". La subjekto de *faras* ne estas *du* aŭ *tri* sed la *aldono* konvencie reprezentata en *kaj*. Ĉiu konvencio povas fariĝi tradicia, sed ĉiu tradicio ne estas konvencia, ekzemple kiam ĝi estas taksata revelacio : la kredo pri la peko de Adamo kaj Eva.

Pri la uzo de *us-modo*. Mi konfesas, ke mi pekis kontraŭ la gramatiko, kaj ankaŭ kontraŭ la vero, ĉar la uzo kritikita de la antaŭa artikolo ne rilatis al *deko*. La frazo devus teksti : "ĉar oni diras *litro da lakto*, tial oni diras *deko da ovoj* kaj *milo da strikantoj* (kaj ne *strikantoj* kiel tio aperis en la artikolo). Kaj

poste mankas la frazo, kies argumenton mi prezentis tro frue kaj malĝuste :
"Se oni diras *milo da strikantoj*, kiujn oni ne precize nombris, kial oni ne
dirus (ĉar tion diskutas la antaŭa artikolo) *multe da strikantoj*, kie *multe*
montras malprecize, sed tamen la kvanton de la homoj. Kompreneble tiu ar-
gumento pri *multe* same valoras pri *iom*. Se oni diras : "Mi trinkis glason
da lakto", kial oni ne dirus : "Mi trinkis *iom da lakto*". Kontraŭe al la aserto
de la antaŭa artikolo *lakto* ne estas komplemento de *da* (paĝo 5, n-ro 14)!!!
sed de *trinki*. En la unua frazo ĉu oni trinkas la glason? Oni trinkas *lakton*,
kaj la esprimoj *glaso* kaj *iom* estas la kvantoj de tiu lakto.

"Mi denove dankas al vi pro viaj kritikoj, kiuj ebligis al mi precizigi
miajn antaŭajn asertojn, kaj petas vin akcepti miajn plej sincerajn saluto-
jn."

F Boyet

Respondo de la Redakcio — La celo de la rimarkoj ne estis pridiskuti
la matematikan teorion, sed nur - por faciligi la kompreneblecon - memori-
gi, ke en la gramatika komuna lingvo *kardinalo* estas fundamenta nombro,
nur ĉar ĝi kontraŭstarigas al vicmontra nombro (PIV).

Binara estas esprimo ne nur franclingva : ĝi ekzistas en la angla *binary*,
ĉar ĝi venas de la latina *binarius*; krome jam de longe ĝi estas uzata en
Esperanto, eĉ troviĝas en PIV de 1970 . . . La eŭfonia argumento estas afero
de gusto!

Ĉu *konvencia*? Konsentite pri via interpreto de la vorto; tio ne malhel-
pas, ke "Du kaj tri faras kvin" estas ja Fundamenta (§ 12) kaj la Fundamen-
ta tradicio estas tute alia ol *revelacio*.

Pri *us-modo*. Ja la kutima diro *deko da ovoj* estas de ĉiam uzata kaj
sekve ne povas esti *us-kondiĉita*. Pri la cetero vi pravas : *lakto* ne estas kom-
plemento de *da*, sed tio ne rilatas al la rimarkoj de la Redakcio!

Fine jen kio montras, kiel teknika temo pravigas teknikan lingvon,
kvankam la *numeraloj* apartenas al lingva gramatiko!

LOKAJ, REGIONAJ, NACIAJ KAJ INTERNACIAJ ESPERANTO-
ORGANIZAJĜOJ ABONU KAJ DISKONIGU "LA LETERON DE L'AKA-
DEMIO DE ESPERANTO". TIEL VI HELPAS LA AKADEMION DE
ESPERANTO DEFENDI KAJ EVOLUIGI LA INTERNACIAN LINGVON
DE D-RO L. L. ZAMENHOF

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

"Ne gravas, se foje vi ne konsentas . . .

La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj! La sola problemo estas konscii pri tia neceso! Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!"

*

En ĉi tiu numero estas respondoj al demandoj faritaj en la Universala Kongreso de Bergen (Norvegio).

*

D.— *La plimulto de la loĝantoj de la mondo (kaj supozeble de la membreco de nia movado) estas virinoj. La malegaleco inter viroj kaj virinoj en la Akademio estas treege malbona. Ĉu la Akademio ne trovos rimedojn por tuj aliĝigi virinojn? Virinoj de la mondo aŭ de la movado, unuigu!*

(Sennoma)

R.— Ĉu dependas de la Akademio, ke kandidatiĝu pli da virinoj? Ŝajnas, ke la unuaj interesatoj estas la virinoj mem!

(JT)

D.— *Komento pri la latina internacia sufikso -al. En Esperanto tiu sufikso -al aperas ekzemple en aktuala, reala, materiala . . . Sed en Esperanto la sufikso latina -al ne estas sufikso. Tio kreas malfacilaĵojn. Tamen la sufikso -al estas tre postulata en fakaj, filozofiaj vortoj, por signifi, ke io havas la kvaliton esti tio, kion la radiko diras. Ekzemple, reala estas tio, kio havas la kvaliton esti res (en Esperanto aĵo). Specifaj demandoj : 1) Ĉu estas direbla ajala, fizikala, psikala? 2) Kiel traduki intentionalis (vorto ofta en Husserl)?*

(Sennoma)

R.— En la latina -al estas sufikso kun la signifo : *rilata al* . . . En Esperanto -a estas sufikso kun la sama signifo : *rilata al* . . . Ne estas do konsilinde uzi ian sufikson -al tute ne necesan precipe en la komuna lingvo. "De superfluo malboniĝas la ĝuo"! Kompreneble oni retrovas la sufikson en radikoj kiel *materialo* kontraŭstare al *materio*; kio ebligas fari diferencon pri signifonuancoj tro proksimaj : *Materio* en ĝenerala senco malsamiĝas disde *materialo* en pli specifa senco . . . La *latineca* vorto *intentionalis* signifas laŭkuntekste la vorton *intenca* aŭ *intenceca*.

(JT)

— Tamen oni atentu la fakajn bezonojn (filozofio, fiziko . . .). La sufikso -al envere tre utilus, kiam oni bezonas havi adjektivon signifantan *rilata al* "adjektiv-radika" substantivo. Ekzemple, procedo rilata al varmo : "varmala" procedo. Manke de ĝi oni uzu neologisman adjektivon : *termika* procedo.

(AA)

D.— *Kio estas pli bona : Italujo aŭ Italio?*

(Sennoma)

R.— Nuntempe ambaŭ estas same bonaj : nur la uzado estonte precizigos la pli uzatan, ĉar pli bona.

(JT)

D.— *Kion opinias la Akademio pri la nuna vortinflacio, pro kiu Esperanto baldaŭ similos al naciaj lingvoj? Alidire ĉu Esperantisto povas koni ĉiujn Esperantajn nefakajn vortojn, kiuj ekzistas hodiaŭ?*

(Sennoma)

R.— Se simple pro vortinflacio Esperanto baldaŭ riskas simili naciajn lingvojn, jen kio montras vivantecon de la lingvo; sed fakte ne ekzistas tiel nomita vortinflacio en la ĝeneralaj sociaj rilatoj . . . Cetere ĉu necesas koni ĉiujn vortojn en iu ajn lingvo? La vorttrezoro de lingvoparolanto dependas precipe de ties interesoj.

(JT)

Demandoj kaj respondoj (sekvo)

D. Birmo estas nomo de lando kaj Birmano signifas membro de ties ĉefa gento. Do kiel nomi Birman civitanon senkonsidere de etno? Sed se Birmano laŭ ordinaraj reguloj de nia gramatiko estas ano de la lando, kiel do oni nomu anon de la Birma etno, opone al nebirmaj etnoj de Birmo. Aliparte la nova nomo Mjanmo aŭ Mjanmao eĉ ne povas solvi la problemon; des malpli la erara anglismo Mjanmaro. Cetere tiu nomo estas abomenata de la popolo ĉar altrudita de la registaro, kiu malgajnis en demokratiaj balotoj.

(Gunnar Gällmo)

R. Estas nenia problemo, krom la propre inventitaj.

Ni kiam ajn rajtos diri, ke la nacia nomo, *Myanma*, ne nova sed ekzistanta jam de pluraj jarcentoj, donas al ni la sinonimon *Mjanmo* por *Birmo*. Tiuj du nomoj estas esence "neŭtralaj" en la Zamenhof-senco: neniuj el amba ŭaludas etnon. Sed, se apliki la 15-an Regulon kun la rigoro, kiun Zamenhof montris en similaj okazoj, ni uzos nur la ĝis nun tradician *Birmo* kaj atendas ĝis la nacia nomo efektive internaciigos: se tiam, kontraŭ ĉia atendo, internaciigos la erara Angla, ni ne havus alian rimedon ol uzi ĝin. Aliparte, se la popolo abomenas ŝtatnomon, supozeble (?) temas pri la plena nomo; t.e. pri *Socialista Respubliko Unio Birmo*.

Vi tute prave diras, ke "*Birmanoj* laŭ ordinaraj reguloj de nia gramatiko estas anoj de la lando". Tion konfirmas la 3-a el la "Rekomendoj pri landnomoj" eldonitaj de la Akademio (Novembro 1985). Ĝi efektive klarigas, ke la rilatoj inter landnomo de iu kategorio aŭ de la alia kun la respondaj nomoj de anoj estas ĉiam la samaj: *Anglujo* aŭ *Anglio* kun *Angloj* kaj *Nederlando* kun *Nederlandanoj*! Alidire *Nederlando* kaj *Birmo* havas nur unu ("gramatikan") nomon por siaj anoj, dum *Anglujo* havas du; *Angloj* kaj *Anglianoj* estas sinonimoj: tio restarigas la ekvilibron, kiun vi povas laŭplaĉe nomi "demokrata".

Eblas ankaŭ diri, ke *ano* en, ekz-e, *Birmano* signifas nur anon kaj nenion alian pli specifan (civitano, loĝanto, ano de la ĉefa etno ktp). Ion pli specifan oni mem klarigu. Ekz-e, se iu apartenas al difinita Birma etno, li tion diru nomante la etnon mem: ekz-e, *Karenoj*, *Ŝanoj*, *Kaĉinoj* . . .

Birmo konsistas el sep Birmaj "dividoj" kaj el sep "aneksaj ŝtatoj" (Ŝtatoj Karena, Ŝana, . . .). Alidire ne ekzistas gramatika rimedo por paroli pri etnoj, nek pli por multaj homaj specifajoj (religio, filozofia aŭ politika aparteno, ktp); ekzistas nur terminologiaj aŭ nomenklaturaj rimedoj. Estas nenio nova en tio; sed ofte la Esperantistoj strebas per gramatiko klarigi nociojn, kiuj tute ne elportas tion.

(AA)

*) Aludo al la lingvo de la Aŝkenazoj. Zamenhof ne opiniis sin rajtigita inventi eĉ la sole logikan nomon: *la Aŝkenaza (lingvo)*; sed laŭ la evoluanta samtempa internacieco li sinsekve parolis pri *la ĵargono*, *la hebre-germana ĵargono*, *la hebre-germana lingvo*, "*yiddisch*", *la lingvo "jidiŝ"*, *jidiŝo*. (Albault: Akademaj Studoj 1986, p. 51; 1987, p. 121). En tiu epoko oni uzis nur la Fundamentan *Hebreo*: ne jam enkondukigis la novismo *Judo*, nek kompreneble ties ne-oportuna kaj ne-internacia paronimo *Jida*, kiu ne respektas la 15-an Regulon de la Fundamento en la kompreno de Zamenhof mem.

Demandoj kaj Respondoj (fino)

Ĝ. Ĉu eblas nom(ig)i la fonemojn esperantajn? (Ili efektive varias de nacio al nacio).(Sennoma)

R. – La esperantaj fonemoj estis iel neprecize difinitaj en la Unua Libro kaj en la Fundamento; sed ili estis pli detale studitaj en la Plena Analiza Gramatiko (1935) kaj lastatempe ankoraŭ de specialisto J.C. Wells en 1978 (Lingvistikaj aspektoj de Esperanto).

Memkompreneble, ke ekzistas nuancaj varioj de nacio al nacio same kiel en iu ajn nacia lingvo de provinco al provinco; sed la ĉefa punkto restas, ke tiaj varioj ne malfaciligu klaran kompreneblecon! (JT)

Ĝ. Ĉu la sufiksoj -oz kaj -iv estas jam oficialigitaj?(n-ro 39)

R. – -oz kaj -iv estas internaciaj sufiksoj troveblaj en multaj sciencaj terminaroj: ilia uzado restis ĝis nun feliĉe limigita precipe en tiaj sciencaj terminoj, kies komprenon ili plifaciligas. (JT)

Ĝ. Kio pri nomoj? Ĉu oni Esperantigu ilin (kun akuzativa finaĵo) aŭ ĉu oni lasu ilin nacilingvaj (kun aŭ sen -n)?(n-ro 990)

R. – Temas sendube pri la propraj nomoj. Nu la ĝisnuna uzado estas lasi ilin nacilingvaj (tamen kun interkrampa proksimuma elparolo el esperantaj literoj). Foje, se nepre necesas, estas aldonita kun streketo la litero -n por eviti dubsencecon; sed tio restas malofta.

Esperantigitaj estas ekzemple nur la urboj, en kiuj okazis Universala Kongreso; sed ĝenerale oni evitas Esperantigitecon, kiu kaŭzus dubsencecon, precipe pri la vortoj antaŭitaj de nacilingvaj vortoj signifantaj *sankta*: *Saint-*, *São*, *San* . . . ktp. (JT)

El "The Australian Esperantist" (September-October 1991, p. 15) - Diversaĵoj".

"VERA GENITIVO?"

"Georg-ies profesio nuntempe estas eĉ pli atentinda . . . "

(tejo - Tutmonde, p. 18, majo-junio 1991)

"Komento de The A. E. : "interesa kreo de genitivo laŭ la modelo de ies / kies / ĉies kc. Ĉu eble ĉi tiuj provoj formi genitivon en Esperanto respondas al aŭtentika sento de manko en nia gramatiko? Kion pensas aliaj Esperantistoj-lingvistoj?"

R. – Ĝis la lasta momento antaŭ la apero de la Unua Libro la finaĵo -es estis la marko de imperfekta preterito laŭ latina modelo; tion oni ja scias. D-ro L.L. Zamenhof fine forlasis tiun verban valoron por -es, verŝajne konsiderinte, ke la kunmetitaj tempoj povas eviti la formiĝon de tia tempo dank'al la valoro mem de la participoj; kaj konsekvence li ekuzis la finaĵon por iu limigita nombro da genitivaj pronomoj, tiu de la tabelo . . . Sed estu rememore, ke en la Fundamento D-ro L.L. Zamenhof strikte skribis, ke "la genitivo (estas markita per la prepozicio) de".

Ne estas konsilinde atenci la Fundamenton (§ 2).

(JT)

SKRIBAS LEGANTO

D.— (el letero de s-ro Heinz Platzer, amiko de la redaktoro el Vieno en Aŭstrio) — En "La deveno de Esperanto" (de Geraldo Mattos, Fonto 1987) mi legis : "La tempo abundas por la denaskulo, kiu lude-trude elturniĝos el la multaj lingvaj restriktaj, sube ekzemplataj per la portugala lingvo : . . ." (p. 13); ". . . (mi ekzemplas per la portugala) . . ." (p. 24). En "Centjara Esperanto" (jubilea libro de akademianoj, Fonto 1987) oni legas en artikolo de prof. Michel Duc Goninaz : ". . . la elparolo de ĉ estas ekzempligita por ruslingvanoj per . . ." (p. 100). Ĉiuj substrekadoj de mi).

Laŭ PIV ekzempli estas samsignifa kun klarigi per ekzemplo kaj laŭ regulo C (kapvorto *ig/) ekzempligi estus aŭ igi ekzempla (= igi < prezentanta ekzemplon > aŭ fari [ion] -o. (Rim. : anigi = fari ano). Malgraŭ tio mi ne plene komprenas, en kiaj cirkonstancoj oni uzu ekzempli kaj kiam ekzempligi.

R.— Ekzempl/o estas radiko, kies signifo indikas imitindaĵon, konfirmaĵon, ateston; el kio sekvas ĝia substantiva karakterizaĵo, kiu donas por unua vorto de la serio la formon : *ekzempl*o.

-i post substantiva radiko signifas : *agi aŭ stati karakterizate de la radik-senco* (PAG) : do agi per ekzemplo (mi ekzemplas), aŭ stati kiel ekzemplo (tio ekzemplas la signifon de -i).

-igi post substantiva radiko signifas : *fari -a, fari, ke io estu -a* (PAG) : do, igi (ion) ekzemplo, elekti (tion) kiel ekzemplon, fari (tion) ekzemplo [igi la elparolon de Ĉ ekzemplo per . . . / elekti la elparolon de Ĉ per . . . kiel ekzemplon / fari ekzemplo la elparolon de Ĉ per . . .].

Sume la nuanco estas tre elfajna :

Ekzempli revenas al simpla konstato.

Ekzempligi (preskaŭ simila laŭrezulte) supozigas pli da tra-serĉado, malpli da evidenteco.

(JT)

(PAG) : Plena Analiza Gramatiko (§ 280, 299 kaj 358).

NOTO DE LA REDAKCIO

Ĉiu leganto bonvolu senkulpigi nin pro la malfruiĝo kaj kompostmodifoj de ĉi tiu numero. Abrupte ekmalsaniĝis la direktoro kaj kompostisto de LA LETERO, André Bourdeaux, al kiu ni esprimas ĉi tie plej korajn bondezirojn de kiel eble plej rapida resaniĝo.

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio

Redaktoro: Jean THIERRY, Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX Presejo: Coconnier, Sablé s/Sarthe.

C.P.P.P. n-ro 69710 I n-ro: 40 FRF Jara abono: 120FRF. Pagebla ĉe kontoj:

Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris

U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur. 3493; villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.